Somero
2002 (3)
Jul. - Aug. - Sep.

# La Voĉo de Amikejo

informilo pri ***Senlime*** kaj
Esperanto en Euxregiono Mozo-Rejno

BELGIO NEDERLANDO GERMANIO E

En cas de non distribution, renvoyer à:
S-ro Heinrich **Lentzen**,
Feldweg 20
B 4701 KETTENIS
Tel. +32-(0)87-554326
Mail: lentzenh@gmx.net

## Enhavo :

2. **Aligxilo** al la T.L.R.o
3. **Franchimont** (kastela historio kaj legendo)
4. Euxregiona **kalendaro**
5. **Trilanda renkontigxo en Franchimont** (detaloj)
6. Verviersa angulo: **nova kurso** **(nouveau cours)**

**E**ldonita de **V**erviersa **E**speranto- **G**rupo kaj ***Senlime***, kunlabore kun la **M**inisterio pri franclingva **K**omunumo en **B**elgio.

Tiu-cxi informilo senpage konsulteblas kaj kopieblas el niaj ret-pagxoj je la URL: http://www.ping.be/jmjsenlime
H. Lentzen prizorgas surpaperigon kaj sendadon nur al la kotizintaj membroj. La belgaj valonoj, membroj de APE, ricevas la informilon ene de "Inter Ni".

**Editeur responsable / Responsa eldonanto (franclingva):**
GSM +32-486-947.957
Mail: JMJacques@planetinternet.be
J.-M. Jacques, Pl. Verte 23 bte 3,
B-4800 VERVIERS
**Informatie in het Nederlands / Informoj en la nederlanda:**
Tel. +31-43-3062015
Mail: sinno@ibac.rwth-aachen.de
T. Sinno, In 't Oord 45
NL-6291 VN VAALS
**Informationen auf deutsch / Informoj en la germana:**
Tel. +49-2406-7809
Mail: hogen@t-online.de
K. Hogen, Schütz-v-Rode-Str. 43
D-52134 HERZOGENRATH

### Jara abono / aligxo : 10 EUR

**Belgio** : konto 000-0245571-64
Esperanto-Grupo, rue Donckier 22,
B-4800 VERVIERS
**Nederlando** : konto 57 89 43
Senlime, Rothenbachpark 44
6063 NM Vlodrop
**Germanio** : konto 6623201,
Sparkasse Aachen (BLZ 390 50000)
Im Pesch 20
D-52134 HERZOGENRATH

*Senlime* (Grupo de Verviers) invitas vin al

# trilanda renkontigxo

en Franchimont (B-Theux)
sabaton, la 12-an de oktobro 2002
ek de 09h30.


Mapo

detalojn legu ene...


# Lasu vin inviti al la mezepoka kastelo Franchimont-a

## Historio


Eksa fortikejo de la Liegxa Princepiskopejo, la kastelo estas sendube kreita dum la 11-a jarcento en la eksa Karoloregxa bieno en Theux, cedita al la Liegxa eklezio en 898.



La origina fortikajxo plurfoje estis transformita dum la Mezepoko, eble parte dum la 13-a jarcento kaj, cxiukaze, dum la 14-a jarcento, post fortega brulego en 1387.



Gxi estas garantidonita de la Franchimont-a kastelanaro al la familio de la Marck de 1477 gxis 1505. Dum tiu tumulta periodo el la Liegxa historio okazis grava siegxo de la kastelo en 1487.



La fortikajxo estis konsiderinde alimodelita kaj precipe pligrandigita sub la episkopeco de Erard de la Marck (1506-1538) : konstruado de la cxirkauxremparo kun turo kaj artileriaj kazematoj, transformadoj de la mezepoka « malnova kastelo » igante gxin pli enlogxebla (traborado de largxaj fenestroj, kapelo, vasta kuirejo, Renesanca galerio, turo kun latrinoj).

La milita kaj strategia rolo de Franchimont-o malgrandigxas post la 16-a jarcento (malbona topografia starejo fronte al la artileriaj progresoj) kontrauxe al la fortikejoj longe de la Mozo (Dinant-o, Huy, Liegxo).

Dum gxia Franchimont-a fazo, la revolucio unue sxparas la kastelon. La 7-an de septembro 1789-a, gxi ecx utilas kiel kunvenejo por la Kongreso en Polleur kiu planas la defendon de la regiono. Sed la sekvanta jaro finigxas en kompleta xhaoso. Tiam komencigxas la disrabado de la kastelo, kiu definitive ruinigxas kaj utilas kiel sxtonmino komence de la 19-a jarcento.

MARQUISAT DE FRANCHIMONT

Hodiaù : proprietajxo de la komunumo Theux. Prifosajxoj, riparadoj kaj tauxgarangxoj fare de la Franchimont-aj Kompanianoj, helpataj de la franclingva Komunumo.

## Legendo



La kastelestro Franchimont-a, pia homo, decidis kruce militiri por partopreni la regajnon de la Sanktaj Lokoj. Singardeme li zorgis antauxe kasxi sian trezoron en la subterejoj de la kastelo. Malfelicxe, la Sinjoro de Franchimont, elcxerpigxinte dum la vojagxo, preskaux tuj estis mortigita.

La silueto kastela staradis sur roka pinto borde de la torenta rivero Hoegne. Kvankam dauxre enlogxata, gxi lauxdire estis hantita, almenaux en gxiaj subterejoj : tunelo kondukis de senakvigxinta puto al la loko kie kusxis la trezoro de la Sinjoro.

Verda Virsxafo estis komisiita de la diablo por gardi la kastelan trezoro. Malfelicxa kiu volus gxin sxteli : li havis nenian sxancon savi sian vivon...

*(sekvo en Franchimont...)*

# ★ ESPERANTO

## Euxregiona kalendaro 2002/2003 (1)




Celante plifortigi la interpopolan interkomprenigxon, helpe de la internacia lingvo esperanto, precipe en la Euxregiono Mozo-Rejno, ***Senlime*** publikigas, por siaj kotizintaj membroj, agendon pri la esperanto-arangxoj en la Euxregiono.

Gxi eventuale povas enhavi la programerojn de la lokaj grupoj aux aktivajxojn organizitajn aux subtenitajn de komitatanoj. Gxi neniel igxu kompleta kalendaro de esperanto-arangxoj (aliaj ekzistas).

La Kelmis-aj kunvenoj de la grupoj de ***Senlime*** principe okazas cxiun trian vendredon de monato (krom vintre kaj ferie) en kultur-centro "Select", Lütticherstr. 264.

**Pro eblaj program-sxangxoj, prefere kontaktu la menciitan personon antaux ol partopreni aktivajxon.**

Sabaton, la 31-an de auxgusto 2002 - 9h00 - Beringen (B) - Limburga Esperanto-Tago.
Inf. Pieter Jan Doumen, Peerderbaan 81, 3940 HECHTEL-EKSEL
Tel. +32/(0)11/73.20.47



Vendredon, la 13-an de septembro 2002 - 19h30 - Kelmis (B) - Prelego de Raymond DEMARCHE pri "Jemeno" (1-a parto).
Inf. Raymond DEMARCHE, rue Donckier 22, 4800 VERVIERS
Tel. +32/(0)87/22.68.18

Sabaton, la 5-an de oktobro 2002 - 14h00 - Liegxo (B) - Gxenerala asembleo de Belgia Asocio Por Esperanto (A.P.E.).
Inf. Marcel DELFORGE
Tel. xx 32 (0)71 / 43.14.13
E-mail: mardelforge@busmail.net

*

***Trilanda renkontigxo printempa 2003*** versxajne okazos kune kun "revelo-tago" en Kelmis (B) : dato kaj programo decidotaj.

***Trilanda renkontigxo auxtuna 2003*** versxajne okazos en Liegxo (B) : la temo estos "Simenon" - dato decidota.

Inf. Jean-Marie JACQUES:
Tel. +32-486-947.957
jmjsenlime@planetinternet.be



Sabaton, la 12-an de oktobro 2002 - 09h30 - Franchimont (B-Theux) - Trilanda renkontigxo auxtuna.
Inf. Raymond DEMARCHE, rue Donckier 22, 4800 VERVIERS
Tel. +32/(0)87/22.68.18.

Vendredon, la 15-an de novembro 2002 - 19h30 - Kelmis (B) - kunveno de Senlime (temo decidota).

**Zamenhof-festo : la 15-an de decembro estas la tago de la esperantista kulturo.**
La 15-an de decembro 1859 naskigxis Zamenhof. En 1927, Julio Baghy proponis ke tiu datreveno estu la tago de literaturo kaj libro en esperanto, propono aprobita de la Universala Kongreso en Danzig.

# Trilanda Renkontigxo en Franchimont : detaloj kaj gravaj precizigoj

## VOJO

### Auxtomobile :

**- Auxtovojo E25 LIEGE-LUXEMBOURG**

- Elirejo 45 al SPRIMONT-THEUX - Spa - Banneux
- Gxiru maldekstren al Theux-Spa.
- Rekte antauxen gxis la fundo de la valo: vi transveturos trafiklumojn, arbaron, fortan deklivon.
- Je la fino de la deklivo, je la maldekstro, vi vidos la turon de la pregxejo de Theux. Dauxrigu rekte antauxen sur la ebena sxoseo.
- Atentu kaj malakcelu kiam vi vidos maldekstren gravan konstruajxon kaj pintan sonorilturon el rugxaj brikoj "Institut Saint-Roch". Prunteprenu la maldekstran sxoseon al SASSOR (2 Km).
- Transveturu la ponton super la rivero Hoëgne, poste la traknivelan pasejon.
- Antaux la domareto SASSOR, dekstre, vi vidos la blazonon de la trinkejo "Lardon dodu"...

**- Auxtovojo E42 al PRÜM-TRIER**

- Elirejo 7 al THEUX-LABORU. Sekvu la dekstran rultrakon.
- Je la fino de la elirejo, nepre gxiru dekstren.
- Post 1 kilometro vi vidos florbedon maldekstre, tiam gxiru maldekstren al SASSOR - 3 Km.
- Cxe T-forma vojkrucigxo, **ne** gxiru **mal**dekstren al FAYS sed dekstren.
- En la domareto SASSOR, veturu deksten al THEUX.
- Post 300 metroj vi vidos la formon de blazono kun bruna indikpanelo FRANCHIMONT...

**- Fine,**
Plu stiru dum 700 metroj sur sxoseo malsamnivela por atingi la parkejon (senelirejon), kontraux la fortikajxo. Prefere lasu vian veturilon tie kaj piede supreniru la sxtuparon gxis la lignotaverno (se necesas, veturu supren gxis la malvasta parkejo de la taverno per la malglata vojo je la maldekstro cxe la fino de la du disigitaj sxoseoj).

### Trajne :

- Cxiehaltonta trajno al SPA-GERONSTERE forlasas la stacidomon VERVIERS cxiun 47-an minuton. Ne elvagonigxi en la stacidomo THEUX sed en la sekvonta **haltejo FRANCHIMONT**. Tie vi elvagonigxos je la 3-a minuto post la (9-a) horo... kaj ni veturigos vin al la kastelo tute proksima.

## PROGRAMO

09h30 Akcepto en la trinkejo ***"La graseta lardero"*** [le Lardon dodu].
10h30 Auxtomobila kunveturado al la apuda urbeto Theux: vizito
- Liberigo-monumento,
- urbo-domo,
- pregxejo,...

12h30 Tagmangxo *(cxe la graseta lardero aux en la urbeto, laux tio kion vi volis kaj sukcesis mendi).*
14h30 Rendevuo antaux la kastelo por la vizito (gvidilo en esperanto).
16h30 Vespermangxeto.
17h30 Foriro aux plua babilado...

## MENUO

***Nur por la 20 unuaj mendintoj***, mezepoka mangxo (la mezepoka muziko estas certa, ankaux la tipaj vestoj de la tavernisto!):

**- Supo** : buljono, kasxtanoj, malmolaj ovoj
**- Cxefa plado** : kuniklofemurajxo kun cxerizoj
**- Deserto** : torto kun orangxoj laux la Burbona maniero.

Por tiuj, kiuj preferas (aux ne estis inter la 20 unuaj), eblas mangxi malvarman pladon da fromagxo aux pastecxo ***(nombro ankaux limigita al 15: kiel eble plej frue mendu - atente legu kaj kompletigu la aligxilon!).***

## TRINKAJXOJ

Inter la aperitivoj ni konsilas al vi:
- aux "hypocras" (blanka vino sur pluraj spicoj maceritaj)
- aux "Fleur de Franchimont" (blanka vino, suko de pomoj, floroj de nigra sambuko).

- Se, en tiu trinkejo, eblas trinki kafon (estas escepto !), hordeobieron, regionajn bierojn metiistajn, medon,... kontrauxe la trinkajxo *Coca-Cola* tie estas neacxetebla.

*- La trinkajxoj estas krome pagendaj (ili ankaux acxeteblas en la kastelo mem, same kiel memorajxoj, k.t.p.).*

**V**erviersa **E**speranto **G**rupo

**Komitato de V.E.G.:**

Prezidanto: J. Jacob
Petit Jonckeu 18
4803 POLLEUR
Tél. 087/22.10.79

Kasisto: R. Demarche
Rue Donckier 22
4800 VERVIERS
Tél. 087/22.68.18

Sekretario: J.-M. Jacques
Place Verte 23 bte 3
4800 VERVIERS
Tél. 0486/947.957

V.E.G. dependas de la franclingva
Asocio por Esperanto (A.P.E.)
M. Delforge
Rue des Glacères 16
6001 MARCINELLE

**Cotisations**

Les espérantistes et sympathisants de l'Eurégion sont cordialement invités à soutenir notre programme d'action en versant **dès aujourd'hui** l'une des cotisations (inchangées ! ) suivantes au compte n° 000-0245571-64 de:
Esperanto grupo
Rue Donckier 22
4800 VERVIERS

**D'avance, merci à tous !**

| | |
|---|---|
| APE 2002-2003 | 10 EUR |
| UEA 2003 | 50 EUR |
| ***Senlime*** 2003 | 10 EUR |

# *NOUVEAU Cours* *à Verviers*

**L**e Groupe Espérantiste de Verviers organisera pendant l'année scolaire 2002-2003 une vaste opération de promotion et d'enseignement de l'espéranto dans sa région.

**C**elle-ci débutera par un cours gratuit basé sur son logiciel "Kurso" et sur le roman policier pédagogique du Professeur Piron : "Gerda malaperis" (un second cours sous forme de stage résidentiel est envisagé pour les vacances de printemps ou d'été). Le premier cours comprendra trois phases :

**1. S**ix semaines durant, en soirée, à raison d'une séance de deux heures par semaine (lieux, heures et dates à fixer avec les participants), les élèves se retrouveront autour du professeur pour étudier "classiquement" la prononciation et les bases du grammaire et du vocabulaire de la langue internationale.

**2. L**'hiver venu, le cours se poursuivra pendant 12 semaines par la lecture, à domicile (avec exercices et assistance téléphonique du professeur), des 24 courts chapitres du passionnant roman pédagogique ***"Gerda malaperis"***, qui repose sur quatre principes :

**- Motiver les étudiants.**
Le principal facteur de succès dans l'étude des langues est la motivation. Pour favoriser celle-ci, le livre se présente comme un roman policier, dans lequel déjà dès le second chapitre un événement capte l'attention et éveille la curiosité de l'élève, l'incitant à poursuivre sa lecture.

**- "Plus fréquent est un mot, plus tôt il est introduit".**
La régularité de l'espéranto a permis de le faire dès le commencement. Le service culturel international de Zagreb a mis à notre disposition les listes de fréquence nécessaires, établies suite à l'étude statistique de conversations enregistrées lors de diverses réunions internationales.

**- Répéter les acquis dans des contextes différents.**
Une racine, un mot de vocabulaire ou une structure de phrase s'assimilent d'autant plus aisément qu'ils se répètent fréquemment, surtout si on est attentif à l'importance de le présenter de nouveau, précisément au moment où il aurait tendance à s'oublier.

**- Réduire drastiquement, dans chaque unité enseignée, la proportion de nouveautés à apprendre.**
Dans ce livre, les nouveautés (grammaticales et lexiquales) apparaissent de telle manière que, une fois assimilé le contenu du premier chapitre (ce qui sera votre cas après les 12 leçons préparatoires), l'étudiant comprend au moins 82 % des chapitres 2 à 8, 89 % des chapitres 9 à 12, et 92 % des suivants...

**3. E**nfin, au printemps, l'élève participera, avec des espérantistes germanophones et néerlandophones, aux réunions de l'association ***"Senlime"*** et pourra, s'il le désire, se préparer à un examen élémentaire.

Contact :
J.-M. **Jacques** (0486/947.957).